



**8(144)  
2013**

# Apudvistula Bulteno

## de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Lidia Ligęza

### La aganto

La aganto el Pernambuko  
Multe zorgis pri lingva eduko,  
Ĉiujn revuojn legis,  
Pri movado prelegis  
Kaj rapidis al laŭvica UK-o ...

### La konsilo

Ŝate, ne ŝate  
Studu PIV-on ĝissate ...

### Por pacaj batalantoj, t.e. por tiuj kiuj batalas dum la paco

Sub la sankta signo de l' espero  
Kolektiĝas pacaj batalantoj  
Kaj finfine eblas jam afero  
entombigi lingvon Esperanton.

### Pri iu organizo

Kunsido, kunsido.  
Decido.  
Perdo, perdo.  
Merdo ...

### Apud Vistulo

Kulturdomon apud Vistulo  
Vizitadas ulino kaj ulo;  
Suĉtrinkas jaŭdan teon  
Kaj kultivas ideon  
Verdan, laŭ la konstanta regulo.

### Etapoj

Post festeno kun kreteno,  
Amnarkoto pro idioto  
Jubilo kun imbecilo  
Kaj sentkumulo al furiozulo  
Ŝi fariĝis jam saĝa  
Sed ... preskaŭ okdekaĝa.

### La fableto

La heliko en filiko  
manĝis spikon de tritiko,  
tamarikon en persiko  
kaj brasikon kun papriko  
kaj erikon ĝis koliko.  
Diris li: „post botaniko  
ĝusta estus erotiko,  
eble piko de l' formiko,  
eble fiko kun lumbriko ...”

### La providenca viro

Por la epoko  
– stabila, forta roko;  
por la edzino  
– de singardo kaj timo kombino.

### Post koncerto

Kiam fine ekmutis ĉia instrumento  
Ekaŭdiĝis plej bela muziko – silento.

## Diversdirektaj travivaĵoj kun kaliketo da medo enfone

La laŭvicaj, XXIX Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES en Poznano, aranĝo de multaj jaroj ŝatata kaj aprecata de la esperantistaro sendepende de la aĝo okazis en la Kulturdomo de Fervojistoj. Anoncis ĝin belega, bunta afiŝo kun parte kuniketo, parte kateto en turkisa robo, kies aŭtorino estis sepjara Mirka Janowczyk, filineto de Paweł, unu el la organizantoj. Oni devas menciigi ankaŭ pri la meritoj de Tobiasz Kaźmierski, Wiesław Liebner – la mastro de la loko kaj Oksana Janowczyk, edzino de Paweł kaj patrino de Mirka, kiu lerte, plensence kaj nemultekoste ofertis kafon, teon kaj frandaĵojn en la bufedo.

La programo de la aranĝo estis tiom abunda, ke la programerojn oni realigis duoble aŭ eĉ trioble, do ne eblis aŭskulti ĉiujn. (Mi ne skribas pri prelegoj konsideritaj de Ilona Koutny kaj pri tiuj, en kiuj mi ne sukcesis partopreni.)

Bedaŭrinde, ke ekzistas tiaj devoj, sed bone, ke ni konservas la memoron pri tiuj, kiuj dum multaj jaroj estis inter ni kaj fervore agis – kaj nun ili mankas. Pri vivo kaj laboroj de forpasintaj historiistino Zofia Banet-Fornalowa kaj aktoro Jerzy Fornal parolis Tomasz Chmielik, pri la scienca agado de Remigiusz Mielcarek – Elżbieta Malik kaj Zbigniew Kornicki.

Sebastian Cyprych en la trarigardo "ReVo kaj PReVo" (Reta Vortaro kaj ĝia poŝkomputila versio) montris interesajn aspektojn de la Esperanto-disvolviĝo. Senĉese, kun akcepto de la Akademio aŭ sen aperas novaj vortoj, kiujn ni uzos aŭ ne – sed valoras scii eble ĉion pri tia nova projekto. La aŭtoro kun helpantoj gvidas en interreto la specialan informilon pri tiuj novaĵoj kun kompletaj, diverslingvaj sciigoj pri la signifo, atingopovo kaj derivaĵoj de la proponata vorto.

Bradio Moro, presbitero de la Nigromonta Druida Ordeno, kunfondinto de la druida forumo Nemeto Leviĝanta, membro de la Nova Ordeno de Druidoj, la Reformitaj Druidoj de Gajo, kaj de Ordeno de la Mitrala Stelo prelegis pri Novdruidismo; rememoriginte filozofion kaj agadon de la antikvaj druidoj informis la aŭskultantaron pri renovigitaj en XVIII jarcento konceptoj de la grava, pagana, kelta religio, precipe pri celebrado de ok Festoj de la Jarrado celebrataj konkorde kun ordo de la naturo, aparte por norda kaj suda hemisferoj: Festo de la Mortintoj/Prauloj (novembro aŭ majo), Renaskiĝo de la Suno (decembro aŭ junio), Ekprintempiĝo kaj festo de la diino/sanktulino Brigito (februaro aŭ aŭgusto), Komenco de Printempo (marto aŭ septembro), Plena Printempo (majo aŭ novembro), Grena Rikolto (aŭgusto aŭ februaro), Frukta Rikolto (septembro aŭ marto). Agas kvar grandaj movadoj de novdruidoj; ili estas diversaj, sed ĉiuj flegas la keltan kulturon kaj natur-mistikismon kaj zorgas pri mediismaj aferoj.

Mirejo Grosjean (Svislando) parolis pri „Interkulturaj aspektoj en instruado”, sed la teksto enhavis analizon ne nur de maniero instrui. En ĝi temis pri pli vastaj, esperantaj interrilatoj. El bone aplikitaj ekzemploj rezultis la konkludo, kiun mi povis de longe suspekti, ke la lingvaj nekomprenejoj kaj miskomprenoj ekzistas kaj gravas, sed pli esencaj kaj oftaj estas maleblecoj interkompreniĝi surfone de la interkultura diverseco.

Mi mem havis du programerojn – prelegon „La popola magio de amo”, kiun oni decidis presi en Kanado kun ilustraĵoj de Zofia Stryjeńska kaj la aŭtoran renkonton ĉe la libro „Epizodoj” kaj ĉe pli fruaj publikaĵoj.

Tomasz Chmielik instruige kaj bele elpaŝis kun du prelegoj ilustritaj per sonbendoj kaj diskoj. Ili estis: „Historio de la klezmera muziko” kaj „Vera Gran ĉu akuzita?”. Profunda, mallata belega voĉo de la kantistino ankoraŭ ĝis nun kantas en mia kapo.

Andrzej Sochacki prezentis proprajn fotojn faritajn dum la biciklaj ekskursoj kun anoj de turisma klubo de Staszów. Krom valoraj prezentoj de la naturo la fotoaro efike propagis la aktivan vivmanieron.

Jarlo Martelmonto, moderna artisto kaj poeto elpaŝanta dum multaj ARKONES-oj situaciĝas ie inter poezioj dadaisma kaj konkreta. Verkante svede kaj esperante li kelkfoje gajnis stipendion de la Sveda Reĝo. Liaj spektakloj baziĝas je aranĝo de sonoj farantaj la difinitan etoson. Samtempe la helpantoj montras liajn bildojn kaj spacajn artobjektojn, kiuj korespondas kun la lingva bazo. Ĉi-jara prezento estis titolita "Ma-ma-ma".

Inter kelkaj koncertoj mi kun plaĉo ekaŭdis kanzonojn plenumitajn de Anjo Amika (Hungario), kiu kantas dum multaj aranĝoj en multaj landoj. Inter aliaj tute bonaj plenumantoj de la kanzonoj distingĝis Zuza Kornicka pro belo kaj temperamento.

Kontraŭe, mi estis entute seniluziita post la elpaŝo de Klezmorim Sennomaj – kvinopo el Germanio ludanta klezmerajn melodiojn. Kaj linion melodian kaj ritmon plenumatajn malvigle kaj dormeme mi opinias fuŝitaj. Eble mia malkontento estas rezulto de la alkutimiĝo al mondfamaj, klezmeraj ensembloj agantaj en Krakovo.

Certaj artaj programeroj okazis dum la tradicia „Miela vespero” gvidata tre simpatie de Elżbieta Malik. Ankaŭ tradicie oni regalis nin per tro malgrandaj kaliketoj de la grandioza medo.

La tuto de la aranĝo oni devas pritaksi tre pozitive. Por ĉio mi ege dankas kaj al la organizantoj kaj al la plenumantoj. Mi esperas, ke la jubilea, XXX-a ARKONES, post la jaro estos la same sukcesa.

*Lidia Ligeza*

## **Poznana septembro en la universitato UAM kaj dum ARKONES**

Dum la tria semajno de septembro la pola urbo Poznano reeĥas Esperantan parolon, ĉar jam ekde 1998 dum tiu semajno okazas sesio de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) kaj tuj poste, ĉi-jare jam la 29-an fojon la semajnfina kultura aranĝo ARKONES.

La aktuala interlingvistika grupo – tri brazilanoj, du svisoj, po unu germanino, rusino, hungaro kaj polo – komencis sian trian studjaron. István Ertl prezentis panoramon de la nuntempa Esperanta literaturo. La grupo laboris en tri specialiĝoj: pri internacia kaj interkultura komunikado (lingvistikaj kaj sociologiaj aspektoj) kun Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor, pri literaturo (beletra tradukado) kun István Ertl, kaj pri lingvopedagogio kun Katalin Kováts kaj Ilona Koutny.

La trian specialiĝon povis partopreni la grupo de la unujara instruista trejnado, komuna aranĝo de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj [edukado.net](http://edukado.net). La dek unu aliĝintoj (el Brazilo, Francio, Germanio, Hungario, Japanio, Kanado, Pollando kaj Portugalio) laboris fervore sub la gvidado de Katalin Kováts pri metodologio de lingvoinstruado kaj speciale pri tiu de Esperanto. Ili konatiĝis ankaŭ kun tiklaj problemoj de la Esperanta gramatiko helpe de Ilona Koutny kaj donace povis partopreni en kelkaj okupoj de la interlingvistika grupo.

Al la programo kontribuis Stefan MacGill, eksprezidanto de ILEI kaj nuna vicprezidanto de UEA, pri kursplanado surbaze de la kurso Esperanto etape. La merkreda komuna vespero okazis en bona etoso kun skeĉoj de MacGill, muziko de Suzanna Kornicka kaj komuna kantado ĉe tabloj kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Kelkaj kursanoj ricevis stipendion de UEA - ILEI kaj la fonduso ESF. Tiuj instancoj disponigas stipendiojn, ĉar ili komprenas la gravecon ne nur lanĉi novajn iniciatojn, sed ankaŭ protekti ĝisnunajn atingojn - diris Stefan MacGill. La nuna, trijara kurso finiĝos en 2014. UEA, ILEI, UAM kaj aliaj aktive nun laboras, por ke nova trijara kurso povu komenciĝi en septembro 2014.

La semajnfina aranĝo Arkones proponis interesajn prezentojn kaj koncertojn por malstreĉigi la gestudentojn. Sed ankaŭ ili kontribuis al la programo: Mireille Grosjean, freŝe elektita prezidanto de ILEI prelegis pri interkultura instruado kaj ekzercis la interesiĝantojn pri Aikido; Ivan Colling raportis pri la brazila Steldomo kaj analizis la lingvoprojekton de Leibniz. Ankaŭ la instruistoj prezentis siajn aliajn flankojn: Katalin Kováts malkaŝis la sekretojn kial kaj kiel ŝi faras vitrajn juvelojn, poste ŝi streĉis la interesiĝantojn per la viva varianto de la RISKO-ludo, kiu furoras en [edukado.net](http://edukado.net). István Ertl trafe parodiis la Strategian planon de UEA, kiun la antaŭan tagon prezentis Stefan MacGill.

*Ilona Koutny*

## *Miaj rememoroj de la ferioj*

Pasigitajn en 2013 j. feriojn mi rememoras kun sento. En tempo-periodo de julio al duono de septembro mi estis en kelkaj interesaj lokoj kaj profitis de ĉarma, suna aŭro. Do:

- de 21-a de julio ĝis 3-a de aŭgusto mi estis en Busko-Zdrój, en sanatorio „Nida-Zdrój”,
- de 17-a ĝis 31-a de aŭgusto – en sanatorio „Lwigród” en Krynica,
- de 8-a ĝis 15-a de septembro – en Zawoja, ĉe gesinjoroj Malik, kiuj gvidas turisman kaj ripozan agadon.

Sanatorio „Nida-Zdrój” estas situata en vasta tereno, kie estas multe da arboj, arbustoj kaj tre multe da belaj floroj. Tie estas ankaŭ malgranda fontano kaj baseneto kun belegaj, koloraj fiŝoj, sporta stadiono kaj loko, kie oni povas organizi aliajn artajn aranĝojn kaj renkontojn ĉe bivakfajro. En ĉi tiu sanatorio oni povas ankaŭ profiti de kvin sanatoriaj procedoj: banoj (sulfuraj, jodaj-bromaj, ozonaj, perleskaj), ŝlimtorfaj kompresoj, magnetaj kuracoj, masaĝoj kaj gimnastiko. Loĝkondiĉoj estis bonaj (multaj ĉambroj estis unu- kaj dupersonaj), servistaro ĝentila kaj agrabla, manĝado bona. Oni povas ankaŭ partopreni en promenadoj tra la urbo kaj al aliaj interesaj lokoj, kun la faka gvidanto. De ĉi tiuj atrakcioj mi kun plezuro profitis.

Sanatorio „Lwigród” en Krynica troviĝas sur la sufiĉe alta deklivo apud parko, proksime de aŭtobusa haltejo. En tiu konstruaĵo troviĝas granda teraso, sur kiu eblas sunbruniĝi kaj varmiĝi kaj admiri panoramon de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. En la sanatorio oni povas profiti de tri sanatoriaj procedoj: sulfuraj banoj, masaĝoj kaj gimnastiko. De la loĝkondiĉoj kaj diversaj servoj mi estis entute kontenta. Oni ofte organizis artajn aranĝojn kaj konkursojn kun donacoj. Dum unu el ili eĉ mi sukcesis gajni promenajn bastonojn. Krom tio estis organizitaj multaj promenoj al urbo. Ni tie vidis multajn interesajn objektojn, konstruaĵojn kaj monumentojn. Precipe plaĉis al mi akvobaseno, troviĝanta en la parko monumento al la Pola Armeo kaj ĉeparka monumento al Jan Kiepura. Ĝenerale en Krynica ne eblas enui. Restado en tiu urbo estis tre interesa kaj mi rememoras ĝin kun plezuro.

Zawoja estas grandega vilaĝo, en kiu mi pasigis la tempon en tre simpatia etoso, ĉe gesinjoroj Malik. La mastroj estas tre agrablaj kaj bonkoraj. Ĉi tie eblas multaj promenoj tra la montara ĉirkaŭaĵo kun belaj arbaroj, kie oni volonte kolektis diversajn manĝeblajn fungojn, kiuj ĉi-jare ekaperis tre abunde. Kvankam Zawoja estas konata bazo por vizitadi Babia Góra (Virinaĉa Monto) kaj Polica, la plej agrable estis al mi sidi sur ripozseĝo en la sunplena ĝardeno kaj sunbruniĝi, ĉi sezono ĝis la malhela bruno.

Tiel, ĝenerale, pasigitaj de mi ĉi-jaraj ferioj mi opinias tre agrablaj kaj mi rememoras ilin kun la vera plezuro.

*Stanisława Szostak*

*Krakova Societo ESPERANTO*

### **La programo de la renkontoj oktobre kaj novembre 2013 j.**

- 3. 10.** – La societa renkonto. Raporto de la anoj pri la agrabla libertempo
- 10. 10.** – Lidia Ligeza. La rimarkoj pri XXIX-a ARKONES en Poznano
- 17. 10.** – Stanisława Śliwińska. Rakontoj pri fantom-spitantoj. Fragmentoj de la antikva ĉina literaturo en traduko esperanten de Pandiŝo kaj I-Ko
- 20. 10.** – Komunaj ekzercoj en uzado de la gramatikaj formoj
  
- 7. 11.** – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj
- 14. 11.** – Lidia Ligeza. Raporto pri XXXVI-a Internacia Poezia Novembro en Poznano
- 21. 11.** – Stanisława Szostak. Mia triobla sanatoria restado en famaj kuraĉlokoj
- 28. 11.** – Andrzej Feuer. Mnemoteknikaj versaĵetoj